

Svislando kaj la instruado de esperanto
Radioprelego de Claude kaj Andrée GACOND, SRI-812/270, k39, 1979 majo 03, 05

Cl.- Parolas nome de Svisa Radio Internacia gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond pri la disvolviĝo de la esperanto-instruado en Svislando.

Ĉiu studo pri la disvolviĝo de la esperanto-instruado nepre devas reliefigi la pedagogian disradiadon de Ĝenevo.

A.- Jam en 1899 **Ernest Naville** disvolvis la ideon tiam revolucion, ke la enkonduko de esperanto en la lerneajn programojn estas profitiga al la instruado de la gepatra lingvo kaj al la defendo de la klasikaj studoj. Tiu ĉi opinio de la ĝeneva filozofo influadis la sintenon kaj la argumentadon de la adeptoj de la esperanto-instruado, sed aperis kiel utopia aŭ eĉ juĝmanka al la neesperantistoj.

Cl.- La unuan eksperimenton de interlerneja korespondado bazita sur la instruado de esperanto en la lernejo organizis **Edouard Ducommun**. Ĝia rimarkinda sukceso famigis la instruiston de la vilaĝo Les Brenets kaj favoris komence de la dudeka jarcento la disvolviĝon de la esperanto-instruado en la tuta mondo.

A.- Ekde tiam Ĝenevo kaj la Neŭŝatela Montaro fariĝis centroj de pedagogiaj aktivecoj favore al esperanto en la lernejoj.

Cl.- La lernolibroj de la neŭŝatelano **Jean Borel** kaj de la ĝenevano **Edmond Privat** renkontis gigantan sukceson dum pli ol unu generacio kaj influadis la instruadon en la landoj german- kaj franc-lingvaj.

A.- La studoj de **René de Saussure** - la frato de la lingvisto **Ferdinand de Saussure** - pri la derivado kaj la vortformado en esperanto profunde influis la gramatikistojn kaj la Esperanto-Akademion.

Cl.- Sub la aŭspiciado de Ligo de Nacioj, Instituto Pedagogia Jean-Jacques Rousseau kunvokis en Ĝenevo la unuan Internacian Konferencon pri la Instruado de Esperanto. Prezidis ĝin **Pierre Bovet**, ĝia nura laborlingvo estis esperanto. Ĝi kunigis je pasko 1922 plurajn centojn da instruistoj venintaj de 28 landoj kaj delegaciojn de 16 registaroj. Ĝi alportis pruvon, ke esperanton oni jam instruis en la tuta mondo nedevige sed ankaŭ enkonduke al la lernado de fremda lingvo.

A.- Tiu konferenco estis la elirpunkto de enketo pri esperanto en la lernejoj, kiun subvenciis "International Auxiliary Language Association" fondita en Ĝenevo la postan jaron, tio estas en 1923, de la usonanino **Alice Morris**. La enketon gvidis **Pierre Bovet** kaj **Henriette Ith**. Resumon pri la rezultoj publikigis en 1948 UEA sub la titolo "Enketo pri Internacia Lingvo".

Cl.- La konferenco de 1922 havis duan konsekvencon. La postan jaron Internacia Oficejo pri Edukado, kies sidejo troviĝas en Ĝenevo, kontribuis al la fondo de Tutmonda Asocio de Geinstruistoj Esperantistaj (mallongigo TAGE), kies revuo "Internacia Pedagogia Revuo" favoris la disvolviĝon de metodologio de la esperanto-instruado.

A.- Internacia Oficejo pri Edukado kunvokis duan Internacian Konferencon pri la Instruado de Esperanto. Tiu ĉi okazis en 1927 en Prago. Ĝin denove prezidis la direktoro de Instituto Pedagogia Jean-Jacques Rousseau kaj ĝia temo estis "Paco per la Lernejo". La nura laborlingvo refoje estis esperanto.

Cl.- Kunvenanta en Ĝenevo en 1929 la Internacia Kongreso de la Universala Federiĝo de la Pedagogiaj Asocioj, pro la graveco kaj kvalito de la esperantista delegacio envicigis esperanton inter la laborlingvojn.

A.- Tiun unuan disvolviĝon de esperanto en la pedagogiajn mediojn abrupte bremsis la monda krizo ekonomia, la faŝisma kresko kaj la perdo de prestiĝo de la mondanisma idealo identigita kun Ligo de Nacioj. Ekde la jaroj tridek la ĝenerala etoso fariĝis videble malfavora al la disvolviĝo de esperanto kaj malfeliĉe, favora al la agresemo. La dua mondmilito markis la finon de la ĝeneva epoko. En 1947 la sidejo de UEA, kiun Hector Hodler fondis en 1908, translokiĝis al Londono. Siaflanke la gravitocentro de la esperanto-instruistaro svisa translokiĝis al Neuchâtel, kie Edmond Privat estis profesoro en la Universitato.

Cl.- En 1956 tiuj ĉi instruistoj fondis sub la nomo Esperanto-Edukistaro de Svislando asocion, kiu helpis pli bone kunordigi iliajn pedagogajn eksperimentojn. Ĝis tiam la lernejoj esperanto-kursoj restis faktoj izolitaj kaj sen morgaŭo. Sed sub la prezido de **Michel Frésard**, kaj poste de **Charles Ecabert** kaj dank' al la iniciatemo de ĝia **sekretario**, kiu estis mi mem, ĉiu eksperimento de lerneja esperanto-instruado kondukis al kontroloj kaj al raportoj poste diskutitaj en pedagogiaj semajnfinoj, kie ellaboriĝis pli kaj pli taŭga metodologio por la lerneja instruado.

A.- Paralele al tiuj ĉi kunvenoj fakaj estis organizitaj kulturaj renkontiĝoj, kiuj foje grupigis centojn da partoprenantoj kaj atentigis la lerneajn aŭtoritatojn pri la aktiveco de la instruistoj esperantlingvaj. La plej rimarkindaj okazis ĉe la Neŭŝatela Gimnazio en 1959 honore al la Zamenhofa Jubileo, ĉe la duagrada lernejo de la sama urbo la postan jaron. Tiam la latinisto Charles Ecabert raportis pri siaj pedagogiaj eksperimentoj, kaj en la vilaĝo La Sagne en 1961 kie la gelernantoj pretigis vastan ekspozicion pri la temo Esperanto kaj Unuiĝinta Naciaro, kaj fine en 1963 ĉe la Universitato kaj Supera Lernejo Komerca de Neuchâtel bedaŭrinde honore al la memoro de Edmond Privat kaj de Charles Ecabert mortintaj la antaŭan jaron.

Cl.- La nedevegaj kursoj de esperanto gvidataj de **William Perrenoud** ĉe la Supera Lernejo Komerca en Neuchâtel produktis kiel frukton la "Oran Metodon", kiun la hungara metodologo István Szerdahelyi konsideras, kiel la unuan metodon konforman al la lingva strukturalismo kaj al la programita instruado. La nedevegaj kursoj disvolviĝintaj en la unuagrada klasoj en la vilaĝoj La Sagne kaj Les Bois sub mia gvidado kaj tiu de Michel Frésard permesis alĝustigi unuan bazan instruplanon por esperanto.

A.- Inter la plej originalaj kreaĵoj de tiu ĉi periodo ni menciuj la rondojn de interlerneja korespondado, kiujn gvidas ekde 1956 Marcel Erbetta en Bielo, eldonante trifoje jare kajerojn titolitajn "Graĵoj en Vento", kiuj kunigas kontribuojn originalajn de dekkvin klasoj el malsamaj landoj.

Cl.- Ĉirkaŭ 1965 la analizo de la situacio konsciigis pri la enorma plenumota laboro ĝis kiam esperanto troviĝos en la instruplanoj. Tiu analizo aliflanke montris la neceson starigi agadcentron, kiu estu kapabla efike kunordigi la ĝis nun tro diversajn kaj tro individuajn

agadojn de la esperanto-instruistaro. Tial estis fondita en Bielo en 1968 Kultura Centro Esperantista. Tre preciza statuto, tre atente diskutita laborplano kondukis al efika aktiveco.

Cl.- Vi aŭdis raporton pri Svislando kaj la esperanto-instruado. Parolis gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond. Ĝis reaŭdo!

*Kopirajto © Claude GACOND, www.esperanto-gacond.ch
Prilaboris: [Stefano KELLER](#), februaro 2013*